ANTAŬEN suplemento de Informilo 3/29 septembro 2021

**Enhavo:** Banurbo Františkovy Lázně; Loket

# Františkovy Lázně

En junio mi havis okazon pasigi semajnon en la fama ĉeĥa banurbo Františkovy Lázně.

La kuracloko estis oficiale fondita en la j. 1793 de la imperiestro Francisko la Unua, sed onidiroj pri miraklaj efikoj de la loka akvo disvastiĝis tra la imperio jam ekde la 15-a jarcento. La re-saniga akvo el la fontoj, precipe el la plej malnova fonto František, estis uzata ne nur de la lokanoj, sed ankaŭ estis vendata ĉie en Germanio. La kampara banloko kun ligna kolonaro kaj pluraj kuraclokaj domoj tre rapide fariĝis mondfama kuracloko pro multe da parkoj kaj arbar-parkoj.



La urbo estas relative malgranda kun ĉirkaŭ 5 500 loĝantoj, situanta 5 km-ojn for de la distriktur-

bo Cheb (germane Eger). Dum sia glortempo antaŭ la Unua Mondmilito ĝi estis vizitata ĉiujare de ĝis 20 000 pacientoj kaj preskaŭ 80 000 kuraclokaj turistoj. Kiel grava gasto inkluzivis ekzemple jenaj famuloj: Francisko la Unua, imperiestro de Aŭstrio, la Princo Metternich, J. W. Goethe, Ludwig van Beethoven, Johann Strauss, Franz Kafka kaj ankaŭ Václav Havel kaj Václav Klaus, la ŝtatprezidentoj de Ĉeĥio.

Hodiaŭ oni uzas 23 fontojn + torfajn banujojn; la loka akvo efikas pozitive por malsanoj de la kardiovaskula sistemo. Tamen la simbolo de Františkovy Lázně estas la statuo de malgranda knabo (František) kun fiŝo - laŭ legendo, ĉiu pacientino, kiu tuŝos la piedfingron de la maldekstra piedo de la statuo, gravediĝos.

En la historia centro oni povas admiri la kuraclokajn domojn, vilaojn kaj gastejojn, en la parkoj oni trovas multajn monumentojn kaj memortabulojn; la plej multaj rememorigas gravajn personecojn, kiuj iel ligiĝis kun la kuracloko kaj la urbo. Apud la fonto Stanislav en la parko estas ŝtono kun memortabulo de L. L. Zamenhof, la fondinto de la planlingvo Esperanto. Origine tie estis granda monumento memore al la Aŭstria Esperanto-Kon-



greso okazinta en la urbo en la j. 1914. Sed ĝi estis detruita en la j. 1939 kaj la Asocio de Esperantistoj Handikapuloj el Pardubice tie instalis almenaŭ memortabulon, kies aŭtoro estas ano de AEH, Zdeněk Myslivec. Oni povas promeni de fonto al fonto aŭ antaŭvespere halti sur la promenejo kaj aŭskulti koncertojn. Oni povas viziti la katolikan preĝejon de la Altenlevo de Sankta kruco, la evangelian preĝejon de Sanktaj Petro kaj Paŭlo aŭ la magian ortodoksan preĝejon de Sankta Olga. Bedaŭrinde, la sinagogo en la proksimo de la preĝejo estis forbruligita de la nazioj en la j. 1938.

En la ĉirkaŭaĵo oni povas promeni laŭ naturpado tra la torfejo SOOS, kie oni vidos bobelantajn kotvulkanojn, tiel nomatajn mofetojn, viziti la kastelojn Vildštejn aŭ Seeberg aŭ la historian urbon Cheb kun belega gotika templo de la Sanktaj Nikolao kaj Elizabeto. Sed ĉi tiuj jam estas sugestoj por aliaj artikoloj…

St. Nováková

## La kastelo Loket

Urbo kun monumenta gotika kastelo generas unu komplekson. Ĝia nomo naskiĝis danke al ĝia loko super kubuto (ĉeĥe loket) de la rivero Ohře (ger-



mane Ellbogen). La kastelo estas 9 km-ojn for de la urbo Karlovy Vary.
La plej malnova parto de la kastelo estas romia rotondo el la unua duono de la 12-a jarcento. Ni povas trairi historiajn internaĵojn, 26 m-ojn altan turon aŭ eksponaĵon kun porcelano el ĉirkaŭaj fabrikoj. La kastelo servis jam en la epoko de sia kreo kiel prizono por nobeloj. En la jaro 1319 la reĝino Eliška Přemyslovna kaŝiĝis ĉi tie kun siaj infanoj antaŭ sia edzo Jan Lucemburský. La trijara Václav, la posta imperiestro Karolo la Kvara, estis tenata 2 monatojn en la kastela kelaro. La kastela prizonejo funkciis ĝis la j. 1949. Hodiaŭ ni povas vidi en la kelaro ne nur bildojn pri iamaj arestitoj, sed ankaŭ ekzekutiston kun liaj torturiloj, forgesejon (ublieto, malsategejo) kaj skeleton de iu mezepoka virino.
La plej alloga eksponaĵo estas meteorito, kiu falis sur la korton iam en la mezo de la 14-a jarcento. Laŭ legendo tio estas prisorĉita burggrafo, kiu kruele subpremis ĉitieajn subulojn. Li estis transformita en la malmolan ferhavan ŝtonegon, kiu ne estis fandebla eĉ en metalfandejo. En la 19-a jarcento ĝi estis tranĉita kaj la plej grava peco (proksimume 80 kg el la originaj 107 kg) estas deponita en iu muzeo de Vieno.
En la unua etaĝo ni vidis kontinuan ekspozicion de rustika meblaro, historian apotekon kaj religiajn statuojn. Ĉi tie estas ankaŭ gravuraĵoj laŭ lokaj legendoj. La plej konata estas „Pri Jan Svatoš kaj la nimfo el la rivero Ohře“. Ĝi fabelas pri mizeruleto, kiun amis bela nimfo. Sed Jan ekfavoris normalan junulinon kaj volis kun ŝi edziĝi. Kiam la edzig-akompanantaro iris apud la rivero al la preĝejo, aperis la kolerplena nimfo kaj ensorĉis la tutan edzigan akompanantaron en rokojn. Hodiaŭ la rokoj nomiĝas „Svatošské skály“ kaj estas protektitaj. Vi povas

iri tien laŭ blua turisma pado sur la maldekstra bordo de la rivero Ohře.

St. Nováková